Tyron Surmon
@Tyroncs
Tyrontoo@gmail.com



## Resumo

Mi estas 24-jaraĝa viro de Britio, kaj nun loĝas en Londono. Mi studis Historion kaj Politikon ĉe la universitatoj de Oksfordo kaj Misurio, kaj nun laboras por neprofitcela firmao kaj profesie fokusiĝas pri opinisondoj de la Brita publiko. En la Esperanto-movado mi estas TEJO-aktivulo dum multaj jaroj, kaj miaj ĉefaj atingoj inkluzivas organizi Retoson dufoje, kunordigi la skanadon de ĉiuj numeroj de niaj historiaj revuoj, kaj vicprezidantiĝi. Ekster laboro kaj Esperantujo, mi ofte ludas frisbeon, kroketon kaj 'pecklopilkon', legas sciencan fikcion, aŭskultas Eŭrovidajn kantojn, pasigas tempon kun mia koramiko, kaj kreskigas tomatojn!

## Laboro kaj edukado

- **More in Common** 2021-, 'UK Associate'
    - Sukcese starigis la novan fakon kaj prizorgas ĉiujn opinisondojn, inkluzive niajn ĉiumonatajn 'voĉdonajn intencojn'
    - Ĉefaŭtoro de kelkaj raportoj, inkluzive la plej profunda ekzistanta analizo de britaj sintenoj al genra identitato, kaj plej granda neregistara studo de gastigantoj de Ukranaj rifuĝantoj en Britio
- **Universitato de Misurio** (Usono) 2020-2021, MA Atlantika Historio kaj Politiko, GPA 3.97
- **Universitato de Oksfordo** (Britio) 2017-2020, BA Historio kaj Politiko, 'First' (unuaranga rezulto)

## Movada sperto

**En la movado ĝenerale:**

- Ĉeestis multajn eventojn: SES 2017, JES 2017, IJF 2018, SES 2018, IJK 2018, JES 2018, Brita-Franca Kunkongreso 2019, IJK 2019, JES 2019, IJK 2020, RETOSO 2021, UK 2022, IJK 2022, RETOSO 2022, Brita Kongreso 2023, (estonte) IJK 2023
- Verkis multajn raportojn pri eventoj por *La Brita Esperantisto*
- Prelegis pri mia bakalaŭra disertacio dum la reta IJK kaj Virtuala Kongreso, pri Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj 1914-1922 kaj prelegis pri Esperanta historigrafio dum Retoso 2022
- Membro de 4-kapa teamo, verki historion de la junulara Esperanto-movado, kaj ricevis subvencion por tiu projekto. Finis mian unuan ĉapitron en majo 2023, pri la la frua historio de la junulara movado 1920-1960
- Tre aktivas en la Esperanto reditero, ofte respondas la demandojn de komencantoj

**En TEJO specife:**

- Komitatano de TEJO ekde 2018
- Reprezentis TEJOn ĉe la 2018 forumo de UNOY (United Network of Young Peacebuilders – Unuiĝita Reto de Junaj Packonstruistoj) en Hago dum unu semajno

- Vicĉefkunordiganto de Retoso 2021, kaj ĉeforganizanto de Retoso 2022
- Katalogis la arĥivon de TEJO, dum 2 semajnoj en oktobro 2021
- Estrarano ekde marto 2022, kaj vicprezidanto ekde septembro 2022, nun respondecas pri informado, rilatoj kun UEA, la arĥivo, kaj AKSO. Rekta kontaktpersono por 3 laborantoj
- Sukcese kunordigis skanadon de ĉiuj numeroj de Kontakto, TEJO Tutmonde, kaj La Juna Vivo